

## Ekzemplo konvena al ĉiuj gustoj

---

*La kanto de l' korvo*, de Nicola Ruggiero, eld. Espero, Partizánske, 2014, 86 p., ISBN 9788089366231.

---

Restu for de poetoj kaj domaĝu la vivon. Tiu ĉi admono ofte aperas en Ĉina Esperanta Forumo ([verdareto.com/forumo/cina](http://verdareto.com/forumo/cina)). Ne nur tie poezievituloj opinias ke nuntempaj “poetoj” ĉiam plume semas galimantion kaj la fetoro venenas ne nur la versistojn mem sed ankaŭ legantojn. Laŭ la plendantoj, “poetoj” detruas nian lingvon per sia lingvo – plena de neologismoj kaj esprimoj ne vaste konataj.

Kiel atakata versisto mi ne aŭdacas uzi neologismojn ekster *NPIV* (2005), tamen iafoje pro subkonscio uzis vortojn kiuj troviĝas en *Vortaro Esperanto-Ĉina* (1990) sed ne en *NPIV*. Verŝajne Nicola Ruggiero sentis la danĝeron enkonduki neologismojn. En lia poemaro *La kanto de l' korvo* sin trovas nur kelkaj glosindaj kaj prinotindaj vortoj kaj preskaŭ ili ĉiuj estis uzitaj de aliaj verkistoj.

Sed tamen mi tre ŝatas esprimojn ne vaste konatajn, ne ŝablone uzatajn, kompreneble se ili ne estas kontraŭgramatikaj. Ekzemple la esprimoj en la jenaj versoj:

...  
*mi fikse vidis vian dian belon*  
*kaj vian du okulojn el cinam'; pro*  
*la okulpar' mi trafis la ĉielon*  
*malhelan, kiun skribis vi per jambo,*  
*trokeo, hajko. Mi plenumis ŝtelon,*  
*irante pli proksimen nur per amblo.*  
*Mi ŝtelis vian timon per la lipoj,*  
*ĝin igis mia per karesoj manaj*  
*de ambaŭ. Kisis mi vian malĝojon,*

...

Tiu ĉi peco devenas de la unua poemo de la poemaro. Vidante tiujn versojn, iuj poezifobiuloj certe pensus ke la verkinto Nicola Ruggiero estas frenezulo: ŝteli timon, kisi malĝojon... tute ne eblas! Jes ja, almenaŭ unu mia amiko tiel pensus. Iufoje mi babilis en esperantista grupo kreita per tujmesaĝilo QQ kaj dume mi tajpis: “Karaj, ne malŝparu vian inkon!” Li senprokraste rimarkigis: “Inko? Estimata ‘poeto’, ĉi-momente ni tajpas vortojn per komputilo aŭ la ora telefono iPhone 5S!” Ho, tiam mi ekkonsciis ke mi faris eraregon. Antaŭ li mi devas ne uzi poeziecajn esprimojn kiuj ne kongruas kun la vera realo. Se li legus la esprimon

“du okuloj el cinam”, cunamo okazus en lia koro. Nepre li verkus eseon eble titolitan *Versistoj perverse renversas nian lingvon*. Ne! Li neniam, neniel uzus la titolon, ĉar en ĝi troviĝas tiom da versoj. Krome, ‘perverse’ estas konfuza fivortaĉo! Tion li sendube rimarkus. Ofte mi sonĝas ke mi donacis al la amiko la libron *Figuroj retorikaj en beletro Esperanta* kaj ke ĝin leginte, li facile komprenis la esprimon “la tuta urbo bolas”. Ve, ĉiufoje kiam mi vekigis, mi trovas ke la bita vendado de Mondial ne validas en Ĉinio.


Kaj da hermetikeco, kiu fortimigas multajn legantojn kaj deprimigis poezion, mi trovis neniom tra la poemaro. Estas atentinde, ke eldonistoj, legantoj kaj recenzantoj havas siajn proprajn vidpunktojn. Laŭ mi (probable mi antaŭjuĝas aŭ ne havas imagipovon), al iuj poemoj de Nicola Ruggiero eĉ male mankas iom da imagigo. Ekzemple:

### **Fantazii**

*Mi ŝatas fantazii kiam vi ne  
respondas telefone: ĉu vi lavas  
telerojn, vestojn aŭ poluras verkojn,  
eseas pri romanoj, teatraĵoj,  
aŭ simple tualetas, eble nuda?*

Evidente, la poeto mem imagis kaj fantaziis. Legante la poemon, mi imagis nenion. Pro la kultura diferenco? Ŝajnas al mi, ke la poemo, kompare kun la unua k.a., estas nenio alia ol proze priskribi oftan okazaĵon tro realan. Kompreneble kontraŭ mi troviĝas multaj poetoj kaj legantoj kiuj ŝatas ekzemple hajkojn, kiuj konsistas sole el unutona voĉo aŭ blanka-nigra bildo. Se bildo unutona miksiĝus kun voĉo blanka-nigra! Tion preferas mi sed ne ĉiuj aliaj. Bone, ĉar ne ĉiuj havas la saman guston.

Recenzistoj diras, ke ĉe poetoj la percepta konado estas pli multa ol la racia. Poetoj estas pli malraciaj ol ordinaruloj sed ili penas esti raciaj. Tiu ĉi kolizio suferigas poetojn. La du konadoj rezultigas du stilojn: realan prezenton kaj superrealan ellaboradon. Se poetoj faras poemojn tro prozecaj kaj tro realaj, legantoj plendas ke la poemoj estas palaj kaj sensalaj, do nelegindaj. Se poetoj faras poemojn tre poeziecaj kaj superrealaj, legantoj plendas ke la poemoj estas florstilaj kaj trospicitaj, do nelegindaj. Kie estas la kompromisa projekto?



Ĉu Nicola Ruggiero provus kaj trovus la projekton kiu kontentigus ĉiajn legantojn? En la poemaro iuj pecoj plaĉos al prozecamantoj, kvankam tiaj estas tro malmultaj, kaj iuj pecoj plaĉos al poeziecamantoj, feliĉe tiaj estas tre multaj.

*En tiaj versoj vortoj kaj bildoj apudestas simbioze-kolizie, oksimore...*  
Jorge Camacho komentis en la postparolo.

Per metroj kaj parolfiguroj harmonia kunfando de bildoj kaj sentoj igas verkaĵojn poemoj, ne prozaĵoj. Ĉi-flanke Nicola Ruggiero montriĝas forta. Jen la ekzemplo:

### **En via Skotlando**

II

*Korvetoj pepas sur la trotuaroj,  
en tiu ĉi Dolaro grizenuba,  
survoje vin, kaj ili malaperas  
sed voĉas plu sur arboj ombrodonaj.  
Apud trafike brua strat': padeto,  
maldekstre l' verdo herba kaj floretoj  
kaj la unuaj ŝtonoj mortvualaj  
de karmemoraj, tre amataj homoj.  
Kaj vi, la sepa en ĉi kompanio,  
jen simpla ŝton' kaj tamen la plej alta,  
avertas min pri viaj nom' kaj datoj,  
kaj antaŭ vi velkintaj plantoj brunaj  
inter jen flav- jen verdarbustoj povraj;  
mankegas floroj kaj kandeloj varmaj.  
Nuda virino, via Muz', kaj stelo  
kaj l' vortoj "GRANDA" kaj "ESPERANTISTO".*

...

Kiujn informojn la supraj versoj proponas al ni legantoj? En ili ni legas riĉajn bildojn, voĉojn kaj kvietecon, sed Nicola Ruggiero ne ŝablone verŝis larmojn kaj kriojn, tamen tiujn ni povas senti kore kaj okule. La bildoj kaj voĉoj fluas tra spacoj kaj tempoj. La sceno trenas niajn pensojn ambli. Ni volas kisi la malĝojon de la poeto.

Esploristoj akuzas poetojn ke ili parolas nur kun sia animo, ne kun la reala mondo. Reage al tia akuzo Nicola Ruggiero verkis poemojn pri la indiferenta mondo. Ni legu:

*Ĉiutage aperas defioj lacigaj,  
tamen ne ĉiujn ni solvos, ne ĉiujn ni venkos  
kaj bone tiel, ĉar perdoj instruas forton  
se alten kaj ankaŭ leĝere vi portos la pensojn.  
Ni povas multon, ne ĉion: jen niaj limoj,  
jen niaj kapabloj. Rezistu, kara, rezistu.*

(citita el *Al Paulo Silas, plu laŭ ritmo de William Auld (2)*)

La poeto estas kuraĝa ke li per-verse admonas junulojn ne esti indifere-  
rentaj kontraŭ la mondo.

Ĉu poetoj povus savi la kaosan mondon per siaj poemoj? Tion mi  
mem dubas. Tamen tion legantoj kredas, ĉu? Kial esploristoj volas ke  
poetoj portu tian respondecon? Se ĉiuj poetoj parolus ne kun sia animo,  
sed nur kun la reala mondo, ĉu poezio prosperus kiel popularaj kantoj?  
Ĉu ĉiu populara kanto temus nur pri la reala mondo? Kiu povus respondi  
tiujn ĉuojn? Fakte, ankaŭ ne ĉiuj akceptas poemojn pri politikoj, militoj,  
revolucioj, sociaj medioj... Vere, nun poezio estas depresia. Kiel fari?  
Necesas detruemaj konstruistoj! Ne utilas flankaj rigardantoj kiuj apre-  
zas nur kantojn kia estas la monde plej fama naskiĝtaga gratulaĵo *Happy  
Birthday to You*.

Mi esperas ke multaj praktikantoj pri poezio ŝtelos la kuraĝon kaj  
persiston de Nicola Ruggiero. Kaj kredeblas ke nemalmultaj legantoj cis  
kaj trans la Granda Muro ne rifuzas la belan venenon de tiu ĉi poemaro.

Interese, se ni povas ĉasi la kreskajn spurojn kaj la persistan efikon  
de poetoj. Kia feliĉo! Post kiam mi finlegis la poemaron *La kanto de  
l' korvo*, tuj alvenis la unua poemaro de Nicola Ruggiero *Taglibro de  
nenifaranto*, kiu aperis en la jaro 2008 – tiam Nicola Ruggiero estis nur  
22jaraĝa.

Legante la junan poemaron, mi sentis pasion formiki tra mia tuta  
korpo. Ho, tantaligaj amo kaj amoro!

*Vi...  
Vi estas guto  
el pluvo kiu  
neniam falos.*

(citita el la prozpoemo *nokte* de la unua poemaro)

La juna poeto kaŭzas resonancon ĉe legantoj per siaj pensoj. Ni ĉiuj  
havis propran Junecon. La Juneco estas la verda, kio plenas de amoj kaj  
amor-avidoj. Tiuj temoj neeviteble svarmas en la unua poemaro.

De 2008 al 2014, kiam la dua poemaro naskiĝis, Nicola Ruggiero  
maturiĝis kaj en la lingvo kaj en la pensoj. Sed la amo kaj la pasio restas  
ĉe li. Tamen en la profundeco kaj la vasteco ili fariĝis pli delikataj kaj  
raciaj. Nun li ne plu ripete krias “*mi amas vin*”, nek agas kiel “*knabo  
ploras knanjon sub kaŝtano nuda*”. En la lasta poemaro ni klare vidas  
ke la poeto turnis sian amon de ĉefe al la knanjo al geamikoj, pioniroj,  
montoj, maroj, la socio, la homaro...

La turno portas al ni esperon. Nicola Ruggiero estas unu el la kon-  
struistoj, kiuj kuraĝas detruji la poezian tradicion, suĉante la sukcon de  
la tradicio.

Anina Stecay

## Komforta detektivromano

---

*Briĝo kun veneno*, de Ronald Cecil Gates, eld. Flandra Esperanto Ligo, Antverpeno, 2014, 92p, ISBN 9789077066515.

---

Antaŭ nelonge aperis la kvina romaneto en la detektivfikcia serio de R. C. Gates, kiu disvolviĝas ĉirkaŭ la aŭstralia polickomisaro Elis.

La viktimo ĉi-foje estas Adriano Inglis, universitata profesoro pri filozofio. Li mortas trinkinte kafon dum kunveno de la loka briĝa klubo. Manpleno da klubanoj en tiu momento ĉirkaŭis lin, kaj al komisaro Elis dekomence evidentas, ke nur unu el ili havis la eblon meti la venenon en la kafotason de la profesoro... Kutima komenco de averaĝa detektivromano. La enketanta triopo, al kiu aliĝas ĉi-foje krom la jam konata amiko Petro Tomsen ankaŭ la edzino de la polickomisaro, malkovras eksteredzecajn rilatojn kaj profesion kaj kluban konkurencon inter la suspektuloj.

*Briĝo kun venen'* kiel la aliaj romanoj de Gates apartenas al la speco de tielnomataj "komfortaj detektivromanoj", kiuj estas pluevoluo de la angleca enigma romano laŭ stilo de A. Christie. Tio signifas, ke ĝi entenas nek perforton, nek rektan priskribon de seksa kuniĝo, la viktimo mortas sensange kaj la eblaj motivoj restas pure individuaj. La enketo disvolviĝas iom antaŭvideble per la serĉado pri alibioj kaj motivoj kaj rimedoj. Ĝis nun la esperanta libromerkato ne naskis alispecajn krimromanojn, kiel ekzemple nigrajn romanojn, serimurdintojn kaj jurmedicinistajn romanojn, kiuj ja floras en la etnolingvaj merkatoj. Tamen la Gates-a verko, kiu komenciĝas kun la kutima situacio de "izolita loko", nome kun ŝajne limigita grupo de suspektuloj, entenas dum la posta esplorado iun neatenditan solvon.

Sed estas ankaŭ kelkaj negativaj punktoj. Kvankam Gates post entute ses detektivromanoj ja povas esti konsiderata kiel sperta aŭtoro, kelkaj aferoj rilate la intrigon malglatas: Ekzemple tute ne realecas, ke la polico igas privatulinon uzi novan, science ankoraŭ ne aprobitan metodon por identigi la venenon, ĉar tio neniam povus taŭgi poste antaŭ kortumo kiel prava metodo. Iom strange post la unua vespero la polico ne plu sisteme pridemandadas la ĉeestintojn – kelkaj el ili do eĉ ne unu fojon



parolas kun la komisaro, kvankam teorie ili estas suspektuloj. Alia afero, kiun oni bedaŭrinde ofte renkontas en esperantaj detektivromanoj, estas, ke la fina pruvo de kulpeco okazas iom *deus-ex-machina-e*<sup>1</sup>: ne pro kunmetado de indikoj kaj pruvoj flanke de la komisaro, sed la krimulo elperfidas sin mem en interparolado – post kiam li ĝis tiam tiel ruze ĉion planis kaj pripensis. Kaj same kiel en siaj antaŭaj romanoj Gates ankaŭ en ĉi verko rakontas tre detale pri ĉiutagaj aŭ tute flankaj aferoj (ekz. li prezentas dum 3 paĝoj la sid- kaj ŝanĝiĝordon dum iu briĝa vespero, kio estas sufiĉe laciga por ĉiuj kiuj ne entuziasmas pri briĝo, kaj alportas nenion al la intrigo). La problemo tamen ne estas la detalemo en si mem – sed ke Gates ne sukcesas montri iun *konflikton* en tiuj ĉiutagaĵoj, kiun la leganto volus nepre sekvi.

Verkante recenzon pri beletro mi hezitas skribi pri la lingvouzo: tro forta estas la kutimo en Esperantujo serĉi mankantajn akuzativojn kaj komenti neologismojn – aŭ tion, kion la recenzisto konsideras neologismo. Tamen ia komento pri la stilo ja necesas.

La lingvo de Gates estas flua, klara kaj senpretenda, kiel en liaj aliaj romanetoj. Ili bone legeblas ankaŭ por komencintoj. Neologismoj malmultas, anglismoj nur de tempo al tempo aperas: ekzemploj estu “doktora tezo” anstataŭ “doktora disertacio”, aŭ la esprimo “ties vizaĝo estis nigra” (p. 89) – supozeble Gates celis “malgaja”.

Resume *Briĝo kun veneno* restas laŭ stilo kaj rakontmaniero tute en la tradicio de la antaŭaj Gates-aj verkoj. Kiu ŝatis la antaŭajn, do ankaŭ kun ĝuo legos tiun ĉi. Ĉar lingve mankas kaj malglataĵoj kaj spritaĵoj, ĝi estas legebla por komencintoj same kiel por progresintoj. Sed al veraj fanatikuloj de la ĝenro, kiuj legas ankaŭ multajn etnolingvajjn verkojn, mi ne povas senkondiĉe rekomendi ĝin.

1 Latine: “dio el la (teatro)maŝino”, esprimo referenca al la antikva tragedio: en la fino de teatraĵo aŭ literaturaĵo la konfliktojn solvas iu persono aŭ okazaĵo, kies apero estis tute neatendita.